

N-o 142
★
Eldonantaro:
Dr. Léon Zamenhof, War-
szawa (Varsovio)
W. M. Page, advokato, Edin-
burgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto,
București
Teo Jung, Horrem b. Köln
Frans Schoofs, Antwerpen
(Anvers)
P. v. Medem, bank- kaj
fabrikdirektoro, Kaunas.
Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abono.

ESPERANTO

TRIUMFONTO

24. 6. 1923
★
Administrelo:
(sufla adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bei Köln, Germani.
Redaktistaro:
Ĉefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktistaro: M. Butin, L. K.
Literatura redaktisto: Zanoni.
Kunlaborantoj
inter la Esperantistaro de
la tutmondo.
Manuskriptojn oni skribu nur sur
unu flanko de l' papero.
Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas al-
donata al ĉiu specimena kaj unua
numero de nova abono.

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikgilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.
Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.
Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsclenca).

Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b. Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

Sepa Brazila Kongreso de Esperanto.

Kvankam la raporto estas tre detala, ni opinias ĝin sufla grava kaj interesa por plene reperi ĝin malgraŭ la fakto, ke — pro la granda distanco — ĝi ne povas esti tute aktuala. (Rim. de red.)

Eksterordinare brila kaj fruktodona estis la Sepa Brazila Kongreso de Esperanto okazinta en Rio de Janeiro, de 19.—24. aprilo, kiel memorigo de la Centjarfesto de l' Sendependeco de Brazilo. Ĝia Organiza Komitato konsistis el D-ro Heltor Beltrão, ing. Pinto Pessôa, D-ro Carlos Domingues, s-o Alcindo Terra, s-o Antonio Vaz kaj f-ino Esther Bloomfield.

Akceptis la titolon de honora prezidanto de l' kongreso D-ro João Luiz Alves, ministro de l' Enlandaj aferoj, kaj D-ro Felix Pacheco, ministro de l' Eksterlandaj Aferoj.

Ŝtato Maranhão, kies prezidanto, D-ro Godofredo Vianna, jam estas konata kiel amiko de Esperanto, monhelpis la kongreson kaj sendis specialan delegiton.

Aliĝis al la kongreso kiel patronoj kaj sendis oficialan reprezentanton la jenaj ŝtatoj: Amazonas, Pará, Piahy, Rio Grande do Norte, Parahyba, Pernambuco, Alagoas, Sergipe, Bahia, Espírito Santo, Rio de Janeiro, Minas Geraes, Paraná, S. Caiharina, Goyaz, Matto Grosso kaj Teritorio Acre.

19. — Je 16. h. okazis la prepara kunsido sub prezido de D-ro Heltor Beltrão, dum kiu oni elektis la jenan estraron de la kongreso: Prez.: D-ro Leonel Gonzaga da Fonseca, vic-prez. subkolono Nelo José Silveira Sobrinho, ĝen. sekr. D-ro João Baptista de Mello e Souza, unua sekr. f-ino Maria Luiza Bocayuva, dua sekr. Antonio Vaz. Je 20. h. ĉe la Palaco de l' Festo de la Internacia Ekspozicio okazis la solena malferma kunsido sub la prezido de D-ro João Luiz Alves, ministro de l' Enlandaj Aferoj. Ĝin ĉeestis la reprezentantoj de la Prezidanto de l' Respubliko, de l' Ministroj de l' Eksterlandaj Aferoj, de Milito, de l' Publikaj Laboroj kaj de Agrikulturo, de l' ŝtatoj aliĝintaj, de l' Ĉefepiskopoj kaj de multaj gravaj asocioj.

Oni povas kalkuli je ĉirkaŭ mil personoj la ĉeestantaron de tiu brilega kunsido, kiu superis ĉiujn antaŭajn okazintaĵojn en Brazilo.

Faris bonegan paroladon la fama ĵurnalisto Medeiros e Albuquerque, membro de Braz. Lit. Akademio.

De Venezia al Nürnberg kaj Berlin.

Kuraĝigaj vortoj al la eksterlandaj kongresantoj.

Ne pri la belega suda urbo de nia Internacia Konferenco por Komuna Komercita Lingvo, ne pri la raviga kaj impona aspekto de ĝi, ne pri la sukcesplena konferenco mem mi volas paroli al vi, sed pri alia urbo, pri kiu mi ofte aŭdis en Venezia dum privata konversacio de la konferencanoj, pri Nürnberg, la urbo de nia venonta internacia kongreso.

Mi vere miregis aŭdante la demandojn pri la kongreso: Ĉu ĝi okazos? Ĉu estos eble al negermanaj samideanoj partopreni ĝin? Ĉu vi povos garanti al ni, ke ni estos bone akceptitaj kaj ke la vojaĝo estos sendanĝera? Ĉu la kongreso vere estos „internacia“? ktp. — Kial ĝi ne okazu? Oni decidis pri ĝi unuanime en Helsinkoj; mi ne rememoras, ke intertempe okazis la ajn, kio pruvus, ke Nürnberg ne taŭgas kiel kongresurbo, ke Germanio ne taŭgas kiel lando de internacia kongreso. La germana popolo, la germana Esperantistaro intertempe sin ne montris ne inda, esti vizitata de niaj eksterlandaj samideanoj. Kial ili, venontaj el aliaj landoj, timas, ke ili ne estos kore akceptataj? La germanoj ĉiuj, ne nur la germanaj samideanoj, scias, ke ĉiu, kiu vizitis la kongreson, venos kiel gastoj, kiu deziras internacian pacon kaj restarigon de normalaj vivo kaj laboro en la tuta mondo. Kial la kongreso ne estu rigardata kiel „internacia“ kongreso? Jam anoj de pli ol 30 nacioj anoncis sian partoprenon.

Sed oni p'endis — jam dum privata konversacio en Venezia —, oni ankaŭ hodiaŭ plendas enleteroj al la L.K.K., ke la nombro de germanaj kongresanoj estos tro granda, ke la germanaj kelkiloj kvazaŭ sufokos la aliajn. Nu, permesu demandon: Ĉu ne dum ĉiuj pasintaj kongresoj la nombro de la kongreslandaj samideanoj — kompreneble! — ĉiam estis pli granda ol tiu de la aliaj landoj? Komparu la kongresanaron nombron de Praha kaj Helsinkoj! Estus la kvazaŭ kontraŭnatura situacio, se la afero ne estus tia. Pripenus precipe la jenon: Nenie en la mondo la Esp. movado nuntempe estas tiel forta kaj granda kiel en la germanaj landoj de la eŭropa kontinento. Kaŭzo por plendi? Ĉerte ne! Ĉerte tio ne estas „kulpo“ de la germana samideano. Pripenus plue! La plej multaj el la multaj germanaj samideanoj dum la lastaj 10 jaroj ne partoprenis internacian kongreson pro la tre simpla fakto, ke ili fakte ne povis partopreni la postmilitajn kongresojn. Ni,

Poste parolis reprezentantoj de diversaj asocioj kaj de ŝtatoj Maranhão, Pernambuco, Rio Grande do Norte kaj Bahia. D-ro João Luiz Alves, fermante la kunsidon, diris ke li estas tre ravita pro tio ke li havis la plezuron prezidi la kongreson. Ke lia ĉeesto, kiel ministro de la Publika Instruado, signifas, ke la Brazila Registaro, kiu ĉiam rigardis simpatie la propagandon de Esperanto, daŭrigas doni sian moralan kaj materialan apogon al tiu tre utila lingvo.



VII-a Brazila Kongreso de Esperanto.

D-ro João Luiz Alves (X), Ministro de l' Enlandaj Aferoj, la reprezentantoj de la Prezidanto de la Respubliko, de Ministroj, de Ŝtatoj kaj de Asocioj.

Poste okazis koncerto, kiu estis multe aplaudata. La paroladoj, kantoj kaj muziko estis aŭd-ataj en la Ekspoziciejo pere de la Senfadena Telefono.

20. — Je 16. h. efektiviĝis la „Literatura Horo“, kies programo estis la jena: „Esperanto kaj la Universala Paco“ — generalo D-ro J. M. Moreira Guimarães. „Printempo kaj laŭdado“ — f-ino Maria Luiza Bocayuva. „La neŭtrala lingvo en la komerca rilatoj“ — D-ro Heltor Beltrão. Esperanto kaj la poeto“ — D-ro João Baptista de Mello e Souza. „La pioniroj de la Frateco“ — D-ro Lindolpho Xavier.

Je 19. h., okazis vespermanĝo ĉe restoracio „A Vegetariana“.

germanaj Esperantistoj, preskaŭ ĉiuj estas malriĉaj homoj, kiuj ne sukcesis pagi la pro la mizera valuto tro altajn vojaĝkostojn al Haag, Praha, Helsinkoj. Krom tio ni scias, ke ni dum la venontaj jaroj, dum kiuj oni supozeble ne tuj povos reelekti Germanujon kiel kongreslandon, ne povos viziti internacian kongreson, ĉar oni, pro tre evidenta fakti, povas konkludi, ke la germanaj valuto-mizero kaj ekonomia malfortiĝo ne baldaŭ finiĝos. Do, por la plej, plej multaj el ni, la kongreso en Nürnberg estas — kaj restos verŝajne — la sola internacia kongreso, kiun ni povos partopreni. Oni ne miru, ke ĉiu germano, kiu entuziasmiĝis por nia afero, kvazaŭ aŭde kaptas ĉi tiun solan eblecon, ĉeesti unufoje dum sia vivo kongreson vizititan de niaj eksterlandaj amikoj, por fari sian „inte nacia eksperimenton“, por interkonatiĝi kun tiuj el vi, kiuj vi venos el fremdaj landoj, por ĝui internacian laboron kaj feston.

Ne ĝenu la antaŭkongresan ĝojon de la anonciata germanaj samideanoj, plendante pri la tro granda nombro de ili. Se ni estus aranĝintaj por Nürnberg „germanan“ kongreson, certe ne la duono estus anonciinta sian viziton. Ĝoju pri nia antaŭkongresa ĝojo, ĝoju pri la granda nombro de germanaj nomoj en la kongreslisto! Helpe vi, venonte el ĉiuj landoj, por ke la kongreso fariĝu vere internacia! Venu tiom multnombro, ke vi per kvin aŭ ses miloj kvazaŭ sufokos la germanan samideanaron, kiu venos al Nürnberg, ne pro la samlandaj kaj nacie samlingvaj samideanoj, sed por kunesiti kun vi, amikoj el ĉiuj nacioj kaj landoj. Se vi volos, vi povos reprezenti la plimulton de la kongresanara nombro. Faru tion! Neniu pri la espereble konstata ebla fakto, ke via nombro superas tiun de la germanaj gastoj, pli ĝojos ol ni mem, jam pro la fakto, ke la kongreso por ni estos des pli bona propagandilo, ĵu ĝi granda estos la nombro de la eksterlandaj kongre anoj.

La urbo Nürnberg estas sufla granda, por gastigi ne nur 7 mil sed eĉ 70 mil gastojn. Kompreneble mi mem scias tion jam el Helsinkoj, kie kelkaj parolis pri Nürnberg kiel pri „malgranda urbo“. Ĉar mi mem volis scii, kiamaniere laboras la L.K.K. en Nürnberg, post Venezia mi vizitis la kongresurbon. Mi jam en pasintaj jaroj estis tie, sed mi tiam vizitis la urbon, vidante kvazaŭ nur per „germanaj okuloj“. Sed nun mi volis vidi kvazaŭ per „okuloj de negermanaj gastoj“. Mi forŝiris ĉiujn malnovajn impresojn kaj eniris la urbon nur kiel Esperantisto, veninte el la bela Venezia. Mi devas konfesi, ke la tuta urbo treege kaj ĉiurilate taŭgas por internacia kongreso; ĝi estas plenplena de vidindaĵoj, ĝi donas belegan interesan aspekton. La kongresejo kun sia salonego, kiu sufla

21. — Je 9.30. h. laŭ iniciato de la katolikaj kongresanoj, okazis ĉe la preĝejo „Kruco de l' Militistoj“ meso farita de l' kanoniko Francisco Mac-Dowell, kiu je la Evangelio eldiris bonegan paroladon kaj konsilis la fondon de Esperantista Katolika Ligo en Rio de Janeiro. Oni kantis la preĝon „Saluton, Mario“ kaj Esp. kantojn. Je la 13. h. la kongresanoj efektiviĝis promenadon al la supro de „Pão de Assucar“, kie ili kantis, dancis kaj multe amuziĝis.

La tre konata karikaturlito, D-ro Paul Pedernier, prez. de Brazila Gazetara Asocio, faris tre interesajn karikaturajn. La lasta estis bonega portreto de Zamenhof, sub kiu li skribis la vorton „Antaŭen!“

24. — Je 20. h. en la belega salono de Asocio de l' Komercistoj okazis la solena ferma kunsido kun ĉeesto de reprezentantoj de ministroj, de 18 ŝtatoj kaj de multaj asocioj.

Paroladis pri „Vivo de Zamenhof“ D-ro Venancio da Silva, vicprez. de Brazila Ligo Esperantista. Poste parolis la reprezentanto de ŝtato Parahyba kaj rusa samideano.

D-ro Leonel Gonzaga, prezidanto de l' kongreso, faris malgrandan raporton, per kiu li montris, ke la Sepa superis la antaŭajn kaj kore dankis ĉiujn, kiuj per sia ĉeesto aŭ apogo briligis la kongreson.

D-ro Estacio Coimbra, Vic-Prez. de la Respubliko, telegrafis al la prezidanto de la Organiza Komitato, gratulante lin pro la grandega sukceso de l' kongreso, kiun li ne povis partopreni pro foresto.

Poste okazis bonega koncerto, kiu finiĝis per la himno „La Espero“ kantita de 25 fraŭlinoj. Laŭ diro de la tuta gazetaro, kiu detale raportis pri ĉiuj okazintaĵoj, la kongreso tre favore impresis la publikon.

Estas inda je speciala mencio „Jornal do Commercio“, la plej grava ĵurnalo en Brazilo, kiu dum sep tagoj dediĉis al la kongreso multajn kolonojn kaj publikigis ĉiujn paroladojn. Mi kredas, ke neniam tiel okazis en la ajn Esp. kongreso.

Estas ankaŭ notinda la fakto, ke la ĉefaj komercaj asocioj aliĝis al la kongreso.

Ĉefaj decidoj de l' kongreso.
a) Reelekti la estraron de Brazila Ligo Esperantista, kiu konsistas el la jenaj personoj: Prez.: Ing. A. Couto Fernandes. Vicprez.: D-ro Venancio da Silva. Ĝen. sekr.: Ing. H. Motta Mendes. 1-a sekr.: s-o Odillo Pinto. 2-a sekr.: f-ino Yrany Baggi de Araujo. Kasisto: s-o E. Felix Tribouillet.

b) Rekomendi ke la klera profesorado brazila, ĉiam progresema, akompanu la fremdan profesoron en la spertoj jam faritaj, por ke ankaŭ en Brazilo estu pedagogie montrata la valoro logika kaj morala de Esperanto.

c) Rekomendi la fondon de Esperantista Komerca Grupo en Rio de Janeiro.

d) Konsili, ke la tuta laboristaro lernu la admirindan lingvon de la nemortebla genio Zamenhof.

e) Inviti ĉiujn tutmondajn Esperantistojn por monhelpi, laŭ illa povo, la subtenadon de „Esperanta Ligilo“.

por 10 mil gastoj, estas tiom granda, impona konstruaĵo, ke nur en malmultaj urboj de la kontinento oni trovas similajn domojn. La porkongresa laboro estas en bona ordo, en taŭga manoj. En la L.K.K. oni laboras, laboregas, kiel decas al personoj, kiuj preparas grandegan kongreson. La urba registaro favoras nian aferon. La Nürnberganoj — burĝoj de malnova „libera urbo“ — jam dum jarcentoj estis kaj restis ĝis hodiaŭ „demokrata popolo“, libera de ĉia ŝovinista sentado, komprenanta la gravecon de nia internacia ideo.

Kompreneble kelkaj el niaj samideanoj, vojaĝontaj al Nürnberg, devas pripensi tion, ĉu ili volas traveturi la nuntempe „okupitan teritorion“ de Germanujo. Ĉu ili faru tion, pri tio ni ne povas decidi. Eble negermanaj vojaĝantoj ne trovas malfacilaĵojn. Ni ne scias! Se ili trovas ilin, tio estos nek kulpo de germanaj Esperantistoj, nek de la germana registaro. Estas nura fabelo, ke nia registaro malpermesos aŭ iomete malhelpos la eniron en nian landon — fabelo pri kiu ni ne povas diri, de kie ĝi naskiĝis.

Pri la favora sintenado de nia germanrespublika registaro al la kongreso kaj ties gastoj, mi volonte, se oni postulas garantion, garantios. Vi intertempe la jam aŭdis, ke la Germanrespublika Prezidanto, petita de la Germana Esperanto-Instituto, kiu subtenis la Germanrespublikan Ministerio por Interno, konsentis esti la honora protektanto de la kongreso. Ĉu tiu fakto ne estas sufla garantio? Ni aldonu, ke post la scigo de sia konsento, la Prezidanto persone akceptis min dum aŭdienco en Berlin, donante al mi okazon raportiri pri la kongreso, pri nia movado, pri nia celo. Nian devizon „Per Esperanto por internacia paco“ li tute kore konsentas. Ovi akceptis min pro simila raporto en la ministrejo por Eksterlandaj Aferoj, kaj el tri aliaj ministerioj germanrespublikaj la „ŝtataj sekretarioj“ akceptis, estis anoj de la Honora Kongreskomitato. La germana Ministro por Interno intertempe atentigis aliajn ministrojn de la Germana Respubliko kaj ĉiujn registarojn de la unuopaj germanaj ŝtatoj pri la graveco de nia kongreso ktp.

Nu, zorgu vi, ke la kongreso fariĝu grandega, la plej granda ĝisnuna internacia kongreso, kiu pruvu, ke nia ideo vivas en ĉiuj landoj, ke ĝi estas reprezentata per anoj de ĉiuj popoloj, disvastiĝita tra la tuta mondo.

Estu certaj, ke ĉiu el vi, kiu vizitos Nürnberg-on kiel ano de nia ideo, ĉiam kaj ĉie estos akceptata kiel kara gastoj.

D-ro Dietterle.

Oni diras ...

... ke Intelektala Komisiono ĉe Ligo de Nacioj decidis eksolvi mondlingvan demandon en daŭro de 5,07(6) monatoj. Urgemuloj ĝojegul!

... ke la laŭroj de Vitebsk, kiu havas jam siajn Esperanto- kaj Zamenhof-stratojn, maltrankviligas la Esperanten municipon de Nürnberg; ĝi ordonis la jenan renomon de tuta deko da stratoj: Weltsprachstrasse, Ludwigstrasse, Lazarusstrasse, Samenhofstrasse, Bialystokstrasse, Triumfontastrasse ktp. ktp.

... ke la katolikaj Esp. organizaĵoj, vidante la sukcesojn de SAT, intencas efektiviĝi la vortojn de l' Evangelio „nek heleno nek judo“, utiligante sennaciecan organizmetodon kaj starigante Sennaciecan Asocion Katolikan (SAK).

... ke D-ro Nihilglott eltrovis samtempe sekvanteron de mondlingvoj: Anglito, Welllingua, Esperantidollino kaj Idnepo. Lernolibrojn, vortaretojn, vortarojn, vortaregojn kaj propagandajn broŝurojn mendu ĉe Centra Oficejo de l' societo „Produktu lingvojn Internaciajn!“ en Berlin.

... ke en „Export Esperantisti“ (n-o 19191923) aperadas kontraŭreligiaj artikoloj. Jen vera neŭtraleco!

... ke Germana Esp. Servo estas aranĝonta dum la XV-a fakkunvenon de ĉiulandaj pacoŝovinistoj. Jam anoncis sian partoprenon la „Ligo por forigi tiun krimon: la milito“, kies honora protektanto s-o Poincaré kune kun marŝalo Ludendorff prezidas la kunvenon. La hungara „blanka polico“ p'enumos la gardadon.

f) Rekomendi al ĉiuj brazilaj Esperantistoj la mon kolekton por la monumento al Zamenhof starigota en Varsovio.
Estas ankaŭ aprobitaj multaj dankesprimol.

Asocioj
Esperantistaj aliĝintaj al la kongreso.
Rio de Janeiro: Komerca Asocio. — Societo de Geografio. — Asocio de Komercoficlistoj. — Unuiĝo de l' Komercoficlistoj. — Centro de l' Kaf-komerco. — „Centro Paulista“. — Centro Pernambucano“. (Bonfarintaj membroj.) — Brazila Katolika Unuiĝo. — Asocio de Brazilaj Katolikaj Skoltoj. — Centro de Komerco kaj Industrio. — Nacia Societo de Agrikulturo. — Ligo de l' Lignajartlaboristoj. — Centro Spirita. — Brazila Spirita Federacio. — Unuiĝo de l' Laboristoj je Civila Konstruado. — Klubo de Inĝenieroj. — Societo de Medicino kaj Hirurgo. — Ĉirkaŭaĵa Spirita Unuiĝo. — Ligo de l' Komerco. — Skolta Komitato de l' Centjarfesto.

En kelkaj ŝtatoj ankaŭ societoj neesperantistaj aliĝis al la Kongreso.

V-a Hungara Esperanto-Kongreso en Pécs. 19—21. majo 1923.

La kongreso bone sukcesis. Partoprenis 192 personoj. En la 3 lokaj gazetoj aperis 5 longaj artikoloj pri ĝi. La fama „Litke“ ŝaŭminfabriko komencis la fabrikadon de „Esperantoŝaŭmino“. Oni komencis fabrikadi ankaŭ Esperanto-sapon kaj Esperanto sukeraĵojn.

La 19-an antaŭtagmeze malfermis la lerte aranĝitan ekspozicion s-ano Julio Lajos. En la ekspozicio separate estis elmontritaj la hungaraj gazetoj kaj libroj. La ekspozicio estis bone vizitata.

Posttagmeze malfermis hungare la laborkunsidon D-ro Francisko Pintér. urba konsilanto, anstataŭanto de urbestro. Poste elektis por kongresestraro: hon. prez. D-ro A. Glesswein, prez. Julio Lajos, kunprez. prof. L. König, vicprez. D-ro L. Lőránd, s-ino G. Turzó, D-ro L. Forgon, sekr. D-ro Takács, D-ro J. Balla, not. M. Harasz, G. Selényi, A. Sieron, fino H. Fiedler. Salutis la kongreson la reprezentantoj de grupoj kaj Esperantistoj el 22 hungaraj urboj. La saluton de zagrebaj samideanoj D-ro Maruzzi, de ĉeĥoslovakaj s-ano Badin transdonis. La 20-an posttagmeze dum la dua laborkunsido D-ro Vinzeno Tóth raportis pri la funkciado de Hungara Esperanto-Instituto, kiu dum duonjaro en- kaj elspezis 580.000 kronojn, eldonis la tradukaĵon „Morgaŭ matene“ de Karinthy. Poste D-ro J. Takács parolis pri la propagando de Esperanto kaj proponis, ke la Soc. eldonu la oficialan gazeton en Budapeŝto, ke oni fiksu la kotizaĵon en ora valoro aŭ en avisa prezo kaj ke la agadon de Soc. oni decentraligu al la grupoj. Post longa diskutado de prof. König, D-ro Tóth, Baghy, Turzó, Lajos la kongreso decidis: 1. eldoni la ofc. gazeton en Budapeŝt. 2. la kotizaĵojn fiksi en fundprezo kaj de tempo al tempo fiksi la multoblignombron, 3. ne organizi helpembrecon, 4. la kurspartoprenantoj aliĝu al la Societo. Dum la tria laborkunsido, la 21-an posttagmeze, J. Lajos proponis elekti por la hungara Esperanto himno la kanton „Nova sento“: estas akceptita. Prof. König proponis por oficialigi niajn landajn kongresojn starigi hungaran Konstantan Kongresan Komitaton; la propono estis transdonita por decido al HES. Fine estas akceptita rezolucio, ke la kongreso konvinkiginte pri valora enhavo kaj bonega redaktado de „Literatura Mondo“, alvokas ĉiujn sincerajn Esperantistojn apogi tiun ĉi gazeton per abono kaj disvastigo. Posttagmeze okazis la malferma kunido, kiam D-ro Halmágyi invitis la VI-an hungaran Esperanto-Kongreson al Szombathely. Aplaudis oni akceptis la proponon.

La kongresanoj vizitis la 19-an la Katedralon kaj la katakombojn, la „Litke“ ŝaŭminfabrikon kaj la faman „Zsolnay“ majolikfabrikon, vespere la ekskursojn „Tejye“. La 20-an antaŭtagmeze malfermis la hungaran fak-kunsidon de komercistoj Julio Fürst, prez. de pécsa Komerca Ĉambro. Paulo Balkányi konatigis la rezultatojn de Venezia Int. Komerca Konferenco, kies rezoluciojn la fakkunsido akceptis. Prez. Fürst promesis, ke dum la proksima nacia komerca kongreso oni preparolos la aleron. Poste okazis katolika Esperanto-diservo. PAPA prelato D-ro A. Glesswein diris la meson kaj papa parohestro J. Lajos predikis pri la homifratiga efiko de Esperanto. Post la diservo estis IKA-kunveno.

Tagmeze okazis festtagmanĝo en la „Tannonia“; ĉeestis 50 samideanoj.

Posttagmeze okazis jarkunveno de UEA. Oni elektis por prez. L. König, sekr. D-ro J. Takács. Ĉeestis 10 del. kaj 24 membroj. Cefdel. P. Balkányi raportas, ke UEA havas en Hungario 19 delegitojn kaj 142 membrojn. Oni decidis aŭti s-anon Privai pro la grandaj servoj, kion li faris por Esperanto.

... ke post la XV-a Univ. Kongreso ET aperos ĉiutage. La administracio jam mendis speciale el Cinujo por la presado belan diverskoloran orientan silkpaperon, kiu pro sia malmultkareco permesos malaliligi de l' abonprezo.

Sendis: V. K. en Kr., Ruslando.

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.

Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K. (8-a Daŭrigo kaj Fino.)

Lasta Sceno.

La Patrino. Alberto. Johano.

La pordo dekstre malrapide malfermiĝas, kaj sur la sojlo aperas Johano. Li turnas sin, man-salutas iun ekster la ĉambro, kiun oni tamen ne vidas; poste li eniras, fermas la pordon senbrue kaj rigardas momenton al la Patrino kaj al Alberto.

Alberto. Adiaŭ, patrino; Dio estu kun vi! (Li ĉirkaŭbrakas sin refoje; poste li estas rapide forironta sed, ekvidante Johanon, li subite haltas kaj ekrias.) Johano!

Patrino. Mia knabo! (Iras al li kaj ĉirkaŭbrakas lin.) De kie vi venas?

Alberto (rapide rigle fermas la pordon).

Johano (kvieta). El la urbo.

Alberto. El la urbo?

Johano (kvieta). El la kazino — kun la serĝento Huberto. Li kondukis min ĝis tiu arbo. (Li fingre montras la direkton.)

Alberto (ĝoje). La serĝento vivas!

Johano. Li reiras al la kazino. Li vivas, kaj mi vivas. Mi devas atendi ankoraŭ.

Patrino. Atendi?

Poste estis fakkunsido de gazeta-serva fako. P. Balkányi parolis pri la bona funkcado de „Esperanto (Gazet.) Servo“.

Vespere okazis art- kaj dancvespero. Ĉeestis pli ol 400 personoj. La horo de l' Lajos kantis, Baghy kaj Kalocsay deklamis proprajn poemojn kaj tradukaĵojn. S-ano Ellizs Podvinecz cimbballadis, D-ro Ludoviko kaj Sietano Györy-Nagy violonludis. Baghy en sia propra drameo „Mister Hawkins“ havis grandan sukceson. La plej grandan sukceson atingis la duakta komedio de Kalocsay „Li, kiel ŝi“, en kiu Baghy kaj H. Pechan brile ludis.

La 21-an posttagmeze la kongresanoj faris ekskurson sur la montoj Mecsek, kaj vespere je la 11-a ili forvojaĝis.

La kongreso faris bonan impreson al la urbanoj kaj favoris multajn personojn. Kaj al la Esperantistoj ĝi donis novan instigon por plua laboro.

D-ro J. Takács,
sekr. de V-a Hung. Esp. Kongr.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

6-a cirkulero.

1. Aliĝoj. Ĝis meze de junio anoncis sin 3700 kongresanoj el jenaj 41 ŝtatoj kaj landoj: Anglio (Skotlando, Irlando), Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danio, Danzig, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio (Katalunio), Hungario, Italio, Jugoslavio, Litovio, Latvio, Nederlando, Norvegio, Polio, Rumanio, Ruslando, Svedio, Svislando, Turkio, Ukrainio; Usono, Egiptio, Argentino, Armenio, Aŭstralio, Ĉinio, Japanio, Javo, Kanadio, Meksikio, Sudafriko. — Goliĝa estas la ĉiutage kreskanta nombro de eksterlandanoj. Jen fakto, kiu pruvas nepran internaciecon de la XV-a.

2. Vizo kaj restadpermeso. Ni petas la kongresanojn senprokraste havigi al si, ĉe la eksterlandaj reprezentantoj de Germanio, la germanan vizon por sia pasporto.

La envojaĝpermeso por Germanio ne validas ankoraŭ por Bavario. Speciala restadpermeso por Bavario estas donata de la polica estraro en Nürnberg kontraŭ pago de imposto, kiu estas proksimume kvarono de la oficiala takso: Por angloj 5 ŝ., por aŭstroj 1000 kr., por belgoj 20 fk., por ĉeĥoslovakoj 25 kr., por danoj 4 kr., por finlandanoj 15 fmk., por francoj 20 fk., por hispanoj 6 pes., por holandanoj 3 hfl, por hungaroj 100 kr., por italoj 10 lir., por norvegoj 4 kr., por poloj 3000 gmk., por rusoj 3000 gmk., por svedoj 4 kr., por svisoj 6 sv. fk., por usonanoj 1 dol. — La restadpermeso en Bavario por kongresanoj validas tri semajnojn inter 19. julio kaj 23. aŭgusto laŭ deziro.

La Nürnberga polica estraro petis la germanan ministerion por ekstero en Berlin instrukcii la eksterlandajn reprezentantojn vizl la pasporton ankaŭ sen antaŭa restadpermeso de la Nürnberga polico, ĉar la Nürnberga polico donos restadpermeson al ĉiuj kongresanoj, kiuj posedas kiel legitimacion la kongreskarton.

Pro tio la kongresano petu de la eksterlandaj reprezentantoj de Germanio, krom la germana vizo, provizoran envojaĝpermeson al Bavario (germane: Vorgehmigung für die Einreise nach Bayern) montrante kiel legitimacion sian kongreskarton.

Okaze ke iu reprezentanto eksterlanda ne ĝustatempe ricevis rilatan instrukcion el Berlin aŭ ne volas doni la provizoran envojaĝpermeson, la kongresano turnu sin aŭ letere aŭ telegrafe al „Esperanto Nürnberg“, por ke la LKK tuj interrilatu kun la Fremdula Oficejo kaj peru senprokraste la envojaĝpermeson.

3. Provizora programo. Jen ni publikigas la provizoran programon por la XV-a:

Merk., 1. aŭg.: 2½ K. K. K. Vespere Interkonatiĝa Vespere kun ĝardenkoncerto kaj liala Nokto (kongresejo).

Johano. Mi ne vidis Lin ankoraŭ. Ili ne — mortpafis min. Nun mi devos denove plektadi. Patrino. Sed kio okazis kun vi?

Johano (malĝoje). Okazis — — ke ili ne mortpafis min.

Alberto. Kaj Huberto, la serĝento, vere vivas?

Johano. La barbulo reiris al la kazino. Li ploris.

Alberto. Ĉu vi komprenas lin, patrino?

Patrino. Estas pli bone, ke nur mi parolu kun li. Li ne povas respondi, se ni ambaŭ parolas al li. (Al Johano.) Je kiu horo vi eliris el la domo?

Johano. Je kiu horo? (Pripensas.) Mi ne memoras. Jes, mi memoras: kiam vi dormis ĉe la tablo.

Patrino. Kial en tiuj vestoj?

Johano. Ili jam estis sekaj.

Patrino. Jes; sed viaj estis ankaŭ sekaj.

Johano (pripensas momenton). Mi ne povas diri.

Patrino. Ĉu vi ne kuraĝas diri tion, mia knabo?

Johano. Estas tro multe da vortoj.

Patrino. Vi volis kredigi al la serĝento, ke vi estas via frato, ĉu ne?

Johano. Jes.

Patrino. Kaj ĉu ili scias nun en la kazino, ke vi ne estas via frato?

Johano. Ili pensas ĉiuj, ke mi estas mia frato.

Patrino. Kaj ili ne volis mortpafi vin?

Johano. Jes, ili volis, sed ne povis. Ho, mi memoras, ili pafis ĉiuj trans mian kapon. Kaj nun — mi devas atendi ankoraŭ.

Patrino. Kion atendi?

Johano (post momento). Por vidi Dion.

Alberto. Ĉu vi komprenas lin, patrino?

Ĵaŭd., 2. aŭg.: 9—10 naciaj kunvenoj. 11—1 Solena Malfermo. Posttagmeze kunidoj de L. K., I. S. A. (prepara kunsido), blinduloj. 7½ Festreprezentado de „Majstrokantistoj“ de R. Wagner (Urba teatro). Samtempe Kabaredo de Literatura Mondo el Budapeŝt (kongresejo).

Vendr., 3. aŭg.: 9—11-l-a laborkunsido, 11—1 Filmo de la Leipziga Folro. Posttagmeze 3—6 fakkunsidoj por instruistoj, juristoj, inĝenieroj, kuracistoj, arkitektoj, studentoj, junuloj, poŝtistoj, fervojistoj, laboristoj, virinoj. Vespere granda Madrigal-Koncerto (kongresejo), samtempe Blindula Koncerto (Majstrokantistoj), Pri-sporta Parolado de Yrjö Ojander, Helsinki.

Sabat., 4. aŭg.: 8—10 katolikaj, protestantaj, hebreaĵ diservoj. Samtempe fakkunsidoj por framasonoj, liberpensuloj, bahaistoj, monistoj. 10—12 fakkunsidoj por komercistoj kaj foiroj (Komerca Ĉambro), por I. S. A. (ĉefkunveno), filatelistoj, pacifistoj, vegetaranoj. Posttagmeze 3—7 kunsidoj de Komitato de UEA, por laboristoj, instruistoj, fakgvidoj por teknikistoj tra urbaj institutoj, vizito de kuracistoj al la najbara Universitato Erlangen. Vespere Instrumentkoncerto (kongresejo), samtempe Ĉambromuziko de Nürnberga Kvarteto.

Dim., 5. aŭg.: Tuttaga ekskurso al la belega mezepoka Rothenburg per specialvagonaro kun muzikistaro. Gvidoj tra la urbo. Prezentoj de la Popolteatraĵo „La Majstrotrinko“ kaj de la ĉarma rokoka „Paŝtista Ludo“. La veturo ĉ. 3-hora. Ĉar la specialvagonaro jam nun devas esti mendata, ni petas jam nun anoncojn. Ĉiuj elspezoj (kun manĝoj) estas laŭ la nuna stato 20.000 ĝis 40.000 gmk. — Por nepartoprenantoj en la tagekskurso antaŭtagmeze „Nathan la Saĝulo“ (Urba teatro), posttagmeze ĝardena koncerto (kongresejo), vespere Kabaredo de Literatura Mondo.

Lund., 6. aŭg.: 9—10½ fakkunsidoj por teozofoj, psikistoj, katolikoj, kristanoj, laboristoj, oficistoj, Konkordo, vegetaranoj, militviktimoj. 10½—12½ il-a laborkunsido. Tagmeze komuna fotografado. Ĝenerala kongresbankedo (kongresejo). Posttagmeze ekskurso al „Bestparko“, Dutzendteich (dekdu laĝetoj), Naturteatro (popoldancoj), danceto en restoracio Schmausenbuck. Komuna reveturo. Vespere „Nathan la Saĝulo“ (Urba teatro), samtempe kant-kaj instrumentkoncerto (kongresejo).

Mard., 7. aŭg.: 9—11 fakkunsidoj laŭ bezono. Recitadoj de eminentuloj (kongresejo), gvidoj tra la urbo. Posttagmeze 3—5 il-a laborkunsido. Vespere Internacia Kostumbalo (kongresejo).

Merk., 8. aŭg.: 9—11 Solena Fermo. Ekskurso al la Franka Svisio, Leipzig, Alpoj (Reĝaj kasteloj). Ĝenerala forvojaĝo.

Senpage alireblaj estas Interkonatiĝa Vespere, Recitadmatineo, Kostumbaloj, filmoj, ĝardenkoncertoj, naturteatro. Por la aliaj festaraĝoj la

Patrino. (al Johano). Vi iris ĝis la kazino, ĉu ne?

Johano. Jes, mi iris.

Patrino. Kaj kiu staris ĉe la kazerna pordego por atendi vin?

Johano. Tiu barbulo — la serĝento.

Patrino. Kion li diris al vi?

Johano. Li diris nenion.

Patrino. Sed kion li faris?

Johano. Li prenis mian brakon kaj iris kun mi en ĉambreton.

Alberto. Kiel aspektas tiu ĉambreto?

Johano. Ho, mi scias —, mi rigardis ĉirkaŭe —, nur muroj — unu longa benko kaj unu longa tablo — kun kruĉo —

Alberto. Tio estis la arestejo.

Patrino. Kion vi faris tie?

Johano. Mi sidigis kaj rigardis ĉirkaŭe.

Patrino. Kaj kion tiu serĝento faris?

Johano. Nenion. Li ploris.

Patrino. Ĉu vi restis longe en tiu ĉambreto?

Johano (pripensinte). Jes, longe; sed mi sidis tie —

Patrino. Kio okazis post tio?

Johano (pripensas momenton). Tri soldatoj venis. Ili havis pafilojn kun si kaj kondukis min sur larĝan korton.

Patrino. Kion ili diris al vi?

Johano. Nenion ili diris.

Patrino. Sed kion ili faris?

Johano. Tion mi memoras. Ili starigis min antaŭ alta muro, kaj subite staris antaŭ mi —

sep — ok — naŭ — dek aliaj soldatoj kun pafiloj sur la ŝultroj.

Patrino. Kaj poste?

Johano. Ho, poste okazis io tre terura — (subite) — same terura kiel tiam, kiam mi svingigis super la ŝtonoj — ĉe tiu fumturo. — Ili staris

L. K. K., por certigo de la budĝeto, devas postuli moderaĵn enirprezojn.

Proponante ĉi tiun provizoran programon, volonte ni akceptas gravajn kontraŭproponojn aŭ novajn sugestojn konsidereblajn.

4. Alvojaĝo. Ĉar la Interkonatiĝa Vespere jam okazas la 1. aŭgusto kaj la Solena Malfermo la 2. aŭgusto antaŭtagmeze, ni rekomendas al la kongresanoj alveni en Nürnberg ĝustatempe, do la 1. aŭgusto.

5. Societaj vojaĝoj alkongresaj. Se almenaŭ 30 personoj vojaĝos kune, ili ricevos rabaton sur la germanaj fervojoj. La karavanestroj interrilatu kun la delegitoj de UEA en la concerna urbo, de kiu la karavano ekveturos.

La E-grupo de Koblenz petas nin atentigi, ke ĝi aranĝas Internacian Rejnjan Karavanon al la XV-a kaj invitas speciale la kongresanojn el nordaj kaj okcidentaj landoj, ke ili aliĝu. Detalojn vidu ET n-o 129. Adreso: Esperanto Grupo Florinsmarkt 7a, Koblenz, Germanio.

6. Fervoja tarifo. La tarifo por la ĉefaj limstacioj estas la jena:

Tabelo I. (Prezoj en gmk.)

Al Nürnberg de:	En klasoj				km
	I-a	II-a	III-a	IV-a	
Köln	91000	46000	23000	15000	453
Hamburg	128000	64000	32000	22000	639
Warnemünde	141000	71000	36000	24000	705
Sassnitz	151000	76000	38000	25000	784
Stettin	123000	62000	31000	21000	612
Danzig via Schneidem	189000	95000	48000	32000	943
Danzig via Stettin	196000	98000	49000	33000	980
Beuthen	169000	85000	48000	28000	842
Passau	44000	22000	11000	7300	219
Salzburg	71000	36000	18000	12000	352
Kufstein	59000	30000	15000	9700	293
Lindau	66000	33000	16500	11000	330
Berlin	96000	48000	24000	16000	477

Por rapidvagonaro oni adiciu la krompagon laŭ Tabelo III.

Tabelo II.

Linio:	Mon- unio	En klasoj				km
		I-a	II-a	III-a	IV-a	
Eger—Nürnberg		Rapidvagonaro				
Eger—Schirnding	kē.	9,60	4,8	2,4	—	
Schirnding—Nürnberg	mk.	41000	18500	9100	—	
Eger—Schirnding		Persona vagonaro				
Schirnding—Nürnberg	kē.	—	3,20	1,60	1,—	
	mk.	—	14500	7100	4700	
Oldenzaal—Nürnb.		Rapidvagonaro				636
via Salzbergen— Münster	mk.	66000	33200	16800	—	
Via Salzbergen— Münster		Persona vagonaro				
	mk.	—	50800	15600	—	
Basel—Nürnberg		Persona vagonaro				475
Basel—Weil—Leo- poldshöhe	sfk.	0,35	0,25	0,15	—	
	sfk.	0,15	0,10	0,05	—	
Weil—Leopolds- höhe—Nürnberg		Persona vagonaro				
	mk.	95000	48000	24000	16000	
Schaffhausen— Nürnberg		Persona vagonaro				
Schaffhausen—Bie- dingen	sfk.	1,85	1,50	0,85	—	595
	sfk.	0,25	0,20	0,15	—	
Bietingen—Nürnb.		Persona vagonaro				
	mk.	79000	40000	20000	18500	

Tabelo III.

Prezoj de krompagkaroj por rapidvagonaroj.

	Klasoj: I-a	II-a	III-a
Zono I (1—75 km):	mk. 4000	2000	1000
Zono II (76—150 km):	mk. 8000	4000	2000
Zono III (pli ol 150 km):	mk. 12000	6000	3000
Ni donas la prezojn sen nia respondeco.			

antaŭ mi, unu flanko de la alia. Kaj unu je la dekstra flanko, kiu havis nudan sabron en la mano, kriis ion, kaj subite ĉiuj pafiloj leviĝis kaj celis al mi. — Mi pensis: Jen mi vidas Lin! Kaj mi rigardis al la truoj de la pafiluboj — ok — naŭ dek — truoj. Kaj la soldatoj premfermis unu okulon, kaj per la aliaj, larĝe malfermitaj okuloj ili min fikse rigardis. Ho, tio estis terura — tiuj okuloj! Mi pensis: Jen ili volas trabori min samtempe — tiuj okuloj! (Li premfermas unu okulon kaj priskribas per la etendita brako antaŭ si longan linion.) Ho, estis terure, tiuj tubotruoj kaj tiuj okuloj! Mi pensis, ke refoje mi pendas je la ŝnuro — kaj ke mi svingiĝas tute supre — kaj ke mi falos sur la ŝtonojn — Mi tiel timegis, ke miaj kruroj ektemis.

Patrino. Kaj poste?

Johano. Poste fariĝis nigra nokto — kaj mi falis. Tondris kaj fulmis — kaj post mi sur la muro io kraketadis.

Patrino (post momento). Ĉu okazis nenio plu?

Johano. Jes, io alia okazis, mi memoras. Mi kuŝis sur tablo en granda ĉambro. Homoj par

7. Fakkunsidoj. Pluajn fakkunsidojn anoncis: Sporta Esperanto-Ligo; adr. Ing. Yrjö Ojander, 7 Robertink. 15, Helsinki, Finnlando.

I. B. S. A. (Internacia Biblio-Studentoj Asocio.) Adr. Alfred Egg, Landstrasse 277, Rieden apud Baaden, Aargau, Svislando.

Bahaistoj: Adr. Komerckonsilisto A. Schwarz, Alexanderstr. 3, Stuttgart, Germanio.

Pri defalarango de la fakkunsidoj ni atentigas la kunvenestrojn je nia specialartikolo en ET n-o 140, petante bonvolan atentonon.

8. Loĝigo. La hodiaŭaj prezoj por unu lito estas ponokte (inkluzive 20% imposto): En hotelo unuaranga 30000 gmk., duaranga 24000 gmk., triaranga 15000 gmk.; private gmk. 6000, gmk. 4000, gmk. 2500. Komunaj kuŝejoj en urbaj gimnastikejoj (kovriloj estas kunportendaj) je tre moderaĵ prezoj. La definitivajn prezojn trovos la kongresano sur sia loĝiga karto.

Kiu mendis aliĝile loĝejon, sed poste mem havigis al si loĝejan okazon, bonvolu tuj sciigi ĝin al LKK por eviti duoblan pagadon. Kiu aliĝis kaj mendis ĉambron, sed estas malhelpata partopreni la kongreson, tiu ankaŭ sciigu nin por ke ni alie disponu pri la ĉambroj.

9. Konsulejoj en Nürnberg. Estas jenaj ŝtatoj reprezentataj: Danio, Francio, Meksiko, Nederlando, Norvegio, Aŭstrio, Svedio, Svisio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio. — Se la kongresano havas specialajn dezirojn, li interrilatu kun la rilata konsulo.

10. Gazetara propagando. Ni petas la naciajn asociojn kaj ĉiujn samideanojn sciigi nin, kiujn gazetojn en eksterlando ni invitu, kaj kiujn raportontojn Esperantistajn ni eventuale rekomendu al la gazetoj.

11. Korespondado. La venontaj semajnoj alportos al L. K. K. supozeble alfluegon da leteroj pro loĝigo kaj kongresprogramo. Ni povos respondi nur, se aŭfranko apudas al la demandoj.

Loka Kongresa Komitato.

Represo petata.

Kongreskaravano Berlin-Nürnberg.

Dua komuniko.

La speciala trajno de Berlin al Nürnberg bedaŭrinde ne povas esti efektivigata pro malgranda nombro de partoprenontoj. Anoncis sin ĝis nun 100 personoj. Tiu nombro ne sufiĉas. La karavano okazos nun per du specialaj vagonoj rezervotaj nur al la gekongresanoj en la ĝenerala rapidtrajno. Ĝi forveturos la 1. aŭgusto antaŭtagmeze je 10,07 h. de la Anhalter Bahnhof (Anhalta stacidomo) en Berlin kaj alvenos en Nürnberg vespere je 6.56 h. La vojo de ĉi tiu trajno estos (la ciferoj inter la krampoj signifas la forveturtempoj): Berlin (10,07) — Halle (12,52) — Naumburg (1.42) — Jena (2.21) — Saalfeld (3.25) Probstzella (4.00) — Lichtenfels (5.15) — Bamberg 5.45 — Nürnberg (alveno) 6.56.

Ĉar la veturprezoj devas esti pagitaj al la fervoja direkcio 8—10 tagojn antaŭe, mi petas ĉiun kongresanon, kiu certe volas uzi tiun trajnon, sendi la monon ĝis 15. julio plej malfrue. Pri la kostoj ĉiu samideano, anonciĝinta al mi ĝis nun, ricevos specialan komunikon multobligitan. Germanaj samideanoj pagu al mia poŝtĉeka konto. Berlin 47992, eksterlandaj samideanoj pagu nur en siaj naciaj monoj al mia bankkonto ĉe Steglitzer Bank en Berlin-Steglitz. Aldonu ĉiam vian kongresnumeron.

Ĉiu mونسendinto ricevos presitan kvitancon. Tiu kvitanco estu zorge konservota; ĉar la veturbileto estas enmanigota nur kontraŭ redono de la kvitanco! La veturbiletojn mem mi disdonos plej malfrue la 1. aŭgusto depost la 9-a horo en la Anhalta stacidomo antaŭ la barilo al la trajno.

U.E.A.-gazeto „Esperanto“ kaj la naciaj Esp. gazetoj estas petataj reperi tiun scilgon.

Max Blankenheim,
Berlin-Steglitz, Stubenrauchplatz 5.

ĉambro kun bildoj kaj pentraĵoj sur la muroj. Mi sidis sur seĝo. Antaŭ mi sidis oficioj kaj tiu ĝeneralo. Kaj denove ili demandis min pri ĉio — mi supozas — sed estas tro multe da vortoj —

Patrino. Pripensu bone! Ĉu vi memoras nenion plu?

Johano (*pripensinte, levante la fingron*). Unu el ili certigis, ke vere mi estas idioto. Kaj mi respondis: Tion diras ankaŭ la maljuna Heleno sed estas skribite en la biblio, ke mi estas malriĉa en spirito —

Patrino. Ĉu vi diris tion?!

Johano. Poste la serĝento malbutonumis mian surtuton kaj elprenis la pasporton el mia poŝo — kaj la ĝeneralo enskribis —

Alberto. Donu al mi la pasporton, tuj! (*Li malbutonumas la surtuton kaj prenas la libron, malfermas ĝin, legas — kaj ĝojkrias:*) Ho, patrino! Rigardu! Jen estas skribite —

Patrino. Kio?

Alberto. La milita konsilantaro pardonis kaj eksigis min el la milita servo pro — (*montras la pasporton*) — legu mem!

Patrino. Pro frenez — — Jes! — Ho, Dio ĉiopova, mi dankas Vin! (*Ŝi falas surgenue kaj kaptas la manon de Johano*). Ho, fine veriĝis tio, kio estas skribita: „Feliĉaj estas la plorantoj, ĉar ili estos konsolataj.“ (*Ŝi kisas la manon de Johano*.) Pere de vi, mia knabo, via frato estas redonita al sia patrino!

Alberto (*ĝenufleksante ĉe la alia flanko de Johano kaj kaptante lian alian manon*). Kara frato, kvankam vi agis tute senkonscie, vi savis min de terura morto — dank' al Dio!

Johano. (*ridetas milde, rigardante antaŭ sin*). Kaj nun ni estas denove kune — kaj feliĉaj!

Postkongresa ekskurso al la lago Balaton en Hungarulo.

Rememorante la brilege sukcesintan postkongresan feston en Budapest post la XIII-a Universala Esperanto Kongreso, la Hungara Esperanto Societo decidis aranĝi post la XV-a Kongreso en Nürnberg postkongresan ekskurson al la lago Balaton.

La lago estas la plej granda en Meza Eŭropo. Ĝia longo estas 82 kilometroj, ĝia plej granda larĝo 14 km. Apud la lago estas aro de belaj banlokoj. Ĉirkaŭ la lago komunikigas fervojo, surŝla lago vaporŝipoj kaj motorboatoj. La gekongresanoj vojaĝos kune al Budapest kaj de tie la 11-an de Budapest al Siófok apud la lago Balaton. Se la nombro de partoprenontoj estos sufiĉe granda, ni eble sukcesos ricevi apartan vagonaron. Kluj deziros, povos fari la vojon de Budapest al lago Balaton ankaŭ per flugmaŝino.

Aliĝkotozo: 1 sv. fr. aŭ egalvaloro. Mono kaj aliĝo estas sendotaj al la aranĝanto de la ekskurso: D-ro Karlo Mezei, VI., Terézkörut 4, Budapest, Hungarulo. Por respondo oni almetu respond-kuponon. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ.

Hungara Esperanto Societo.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

I. F. K. K. L.

La Internacia Federacio por Komuna Komerca Lingvo, fondita laŭ iniciativo de l' estinta Internacia Komerca Revuo kaj ricevinta kompletan regularon kaj konstruon en Helsinki 1922, lastatempe invitis la komercistojn fariĝi membroj de tiu faka unuigo, kies celo estas la plena enkonduko de Esperanto en komerco kaj industrio. La kotizo estas 5 svis. fk. jare. La registro de l' Federacio entenas i. a. sekvantajn adresojn:

